**Esperantists in print:** Mr. C. Tingle has nearly a column on "Esperanto and the Common Market" in the *Ripley News* of 9th February, and a paragraph on Esperanto for businessmen in *Reynolds News* of 11th February. In the February *Rotary* Mr. J. Brownlee vouches for the practical value of Esperanto. The *Hexham Courant* of 26th January describes the book received by Miss Boulton from Russia containing two of her poems translated from Esperanto into Russian by Konstantin Gusev of Moscow. *Musical Opinion* for January reports that the friends of Mr. Frank Merrick have formed themselves into an association for the recording of items from his repertoire, and his rendering of Prokofiev's 4th Sonata is particularly praised. In a letter in the February number Mr. Merrick himself gives evidence from his own experience to show that Esperanto "is eminently suitable for singing". Mr. E. L. Fowler presents Esperanto in an article in *The Christian Citizen* of January.

## Abroad

**Germany:** The President of the European Parliament in Strasburg, Dr. Hans Furler, has agreed to be Honorary Protector of the 40th German Esperanto Congress to be held at Whitsun in Oberkirch (Baden). In his letter of acceptance Dr. Furler wrote: "I know how much Esperanto helps to unite nations and serve the cause of peace." In the course of the Congress a street in a new quarter of the town will receive the

name "Esperanto-Strasse"—thanks to the unanimous decision of the City Council, on which sits S-ro F. W. Poppeck, leader of the active local group. Postcards of congratulation should be sent to the Mayor, S-ro Erwin Braun, Rathaus, 7602 Oberkirch (Baden).

In **Nürnberg** on 11th February, S-ro Pilhofer spoke about Esperanto from the regional radio-station. He told his fellow citizens that local papers had devoted 4,900 sq. cm. of space to sixty-nine articles about the language in 1961; that this befitted the first European town to have an Esperanto Club (1888) and one which had had an Esperanto Street for two years. The talk ended with the first verse of "La Espero".

**Austria:** S-ro Peter Haberl has organized a course in Esperanto for tourist-guides, and any Esperantist visitors to Vienna may have a volunteer guide if they will inform S-ro F. W. Rentmeister, Mariahilfstrasse 206/1, Vienna XV/101, of their arrival.

**Switzerland:** Postage-stamps will be cancelled with a special stamp having a portrait of Zamenhof and the text "75 Jahre Internationale Sprache" in postal regions Olten 2, Winterthur 1, during March. Send an addressed envelope and two international reply-coupons to S-ro J. J. Sturzenegger, Rothstrasse 7, Zürich 57, who will send the reply back through the correct post-office.

**Italy:** The new address of the Italian Esp. Federation is: Via Po 7, Torino, open Mon.-Sat. from 10-12 and 4-7 (except August).

## 47-a UNIVERSALA KONGRESO

**Kopenhago—4-11 Aŭg., 1962**

**Novaj Kotizoj:** Post la 31-an de Marto validos jenaj kotizoj:

	£	š.	P.
Kongresano .. .. .	5	1	0
Edz(in)o de kongresano ..	2	10	6
Junul(in)o ne pli ol 20 jara ..	1	15	0
Studento de 20 ĝis 30 jara ..	3	3	6
Blindulo kaj ties gvidanto po ..	2	10	6

**Princino de la Balo:** Dum la Oficiala Balo estos elektita la "Princino de la Balo". Ĉiuj kongresaninoj ĝis 30-jaraj rajtas partopreni.

**Bankedo:** Dum la Kongreso okazos festa Bankedo en la luksa Moltkes-Palaco. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

**Statistiko** (ĝis fino de Januaro): Entute 761 el 33 landoj.

G. G. Pompilio.

## La Junularo Esperantista Brita

Nia semajnfina renkontiĝo okazis en Worcester College, Oksfordo, 3-4 de Februaro. Ĉeestis pli ol 25. Dank' al Diccon Masterman ni disponis lian ĉambron kiel centron, kaj dank' al la dekanato tre komfortan kunvenejon. Sonbendo entuziasmigis nin pri la venonta U.K. Elsa Rapley kaj Heather Tolfree kantadis al ni la trafkanton de la lastatempa kabaredo ĉe la Londona Klubo. Vespere prelegis D-ro Ivo Lapenna. La gracieco de lia lingvaĵo ĉiam plezurigas; ĉi foje imponis lia emfazo je neŭtraleco kaj egaleco. Tamen tia estis lia rego de la lingvo kaj Esperantismo, ke ŝajnis al la aŭskultantaro, ke eĉ ĉe la internacia lingvo unuj estas pli egalaj ol aliaj. Apenaŭ sufiĉis tranoktado ĉe junulargastejo por prepari nin por la progrese kurso gvidata de John Wells, precipe ĉar lia kabareda prelegeto ĉe la Londona Klubo jam nokte distris nin. Bonŝance venis la tagmeza ŝereofesto, kaj la multe preparolataj sed ĝis tiam ne reprezentitaj anoj de la refondita Oksforda klubo aperis.

La kresko kaj vicleco de J.E.B. certe estas tre kuraĝiga fenomeno en la nuntempa brita movado; la nova generacio povas uzi la lingvon en kaj ekster Eŭropo multe pli ofte kaj vaste ol siatempe la gepatra generacio. Oportune disponas la junulara movado la junulargastejojn kaj pli flekseblan laborprogramon. Do pli da semajnfinaj renkontiĝoj tra la lando!

*John Murray.*

**Lastmomenta Informo:** T.E.J.O. kaj S.E.J.U. informas ke la 18-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O. okazos **de la 11-a ĝis la 18-a de Aŭgusto 1962** en Ystad, Suda Svedujo. Detaloj sekvos.

# NOVAJ LIBROJ

*Order starred books from the B.E.A. others from the address given*

\***Kredo, Floroj, kaj Dinamito**, de Ernst Olsson. Red. G. Henriksson. Eld. Eld. Soc. Esp., Malmö, Svedujo. 80 p. Prezo: bind. 12s. 6p. afr. 6p.; broŝ. 7s. 6p. afr. 4p.

D-ro Olsson, mortante 44-jara en 1948, postlasis manuskripton enhavantan biografietojn pri almenaŭ 16 "svedaj pioniroj de kulturo, scienco, kaj tekniko", verkitajn originale en Esperanto. (Dek jarojn antaŭe la sveda Esperantistaro hazarde aŭdis pri li, kiam li aldonis al sia doktoriĝa disertacio esperantlingvan resumon—bela ekzemplo de tute natura, ne-propagandeca sed tamen reklama, uzo de la lingvo.) Por honori sian samideanon, oni nun publikigis tri el tiuj biografioj—la maksimumon finance eblan, el la kampoj de la religio, la scienco, kaj la tekniko.

Al la sanktulino Birgitt (1303–73) la aŭtoro dediĉas nur 12 paĝojn; sed, ĉar li volis eviti kaj psikanalizadon kaj hagiografion (eklezian pritraktadon), tio sufiĉas por prezenti bildon de eksterordinara virino. Ĉe Linnaeus, la plej abunde pritraktita (42 p.), ni ricevas ekrigardon en la intrigojn de la tiama akademia mondo, kiuj mirigas preskaŭ tiom, kiom la genio de la botanikisto. La 17 paĝoj pri Nobel malfermas al ni la tute novan mondon de la eksplodaĵoj.

Papero, litertipoj, bindaĵo, estas indaj je la temaro, nome bonegaj. (Oni sentas nur la mankon de mapo de Svedujo.) La lingvaĵo estas tre klara, makulita nur de ne-zamenhofa uzado de *-ata* post *estis*, krom en la du lokoj 8/—14 (*estis elektita*), kaj 72/—11 (*estis transigita*). (Tre signifa ankaŭ estas la ĝusta uzo de *-ita* ĉe 77/18 *estas konfidita* (historia prezenco: "is entrusted"), 78/3 *devas*

*esti farita*, kaj 66/19 *okupita* ("busy").) Interesaj estas: *kavigi tunelon*, kaj *propre* ("on his own", 70/11). Prezeraroj 9/3, 23/—14, 30/12. Aĉetintoj estos kontentaj.

D.B.G.

**Listo de la kongresaj operacioj.** Eld. U.E.A. 7 p. multobligitaj. Prezo neindikita.

Tiuj, kiuj neniam estis post la kulisoj de U.K. malfermegas la okulojn, legante ĉi tiun dokumenton. Jen la 239 operacioj, kiujn devas plenumi la organizantoj antaŭ, dum, kaj post la Kongreso. Oni proponas (i) la plilongigon de la organiza tempo (komenciĝanta antaŭ la *antaŭa* kongreso!) de 16 aŭ 18 monatoj ĝis 24; kaj (ii) pli netan distingon inter la decidaj kaj la plenumaj organoj. La tuta temo estos ĝisfunde pritraktita en libro de pli ol 200 paĝoj.

D.B.G.

\***Fundamento de Esperanto**, de D-ro L. L. Zamenhof. Indonezia Eldono. Indonezia Esperanto-Instituto, Dj. Gadjah Mada 60, Semarang, Indonezio. 98 p. broŝ. Prezo 5s. afr. 6p.

Oni ofte citas el la Fundamento, sed dum jaroj tiu grava dokumento ne estas havebla kaj al multaj ne estas facile sin turni al ĝi. En ĉi tiu indonezia eldono la Esperanta teksto restas senŝanĝa kiel en ĉiuj aliaj eldonoj, kaj tiu, kiu ne scias eĉ unu vorton de la indonezia lingvo, havas ĉemane tuj konsulteblajn la Antaŭparolon, la Ekzercaron kaj Univerŝalan Vortaron; nur la dek sep reguloj de la Gramatiko restas plejparte nekompreneblaj.

Ĉi tiu eldono estas evidente aĉetinda de studentoj de la indonezia lingvo, sed ĝi estas ankaŭ valora por propagandaj celoj (emfazante, ke Esperanto havas adeptojn ekster Eŭropo) kaj kiel portempa anstataŭaĵo por la angla eldono.

C. D. A. Capŝ.

## El nia Leterkesto

Budapest 7.1.62

Estimataj Sinjoroj!

Laŭ peto de mia malnova korespondantino vi bonvolis sendi al mi la libron titolitan "Bild-Libro pri Bestoj" eldonitan de *Daily Mail*. Akceptu por tio mian plej koran varman dankon.

Jam en la nebula pasinteco mi havis fakstudojn, geografion kaj natursciencojn, kiel profesoro en gimnazio. Nun kiel veterano mi jam ne instruas, tamen la grandformata Bildlibro laŭ aspekto kaj teksto tre plaĉis al mi. Ĝi nepre taŭgas esti uzata dum la Esperantaj kursoj por lernantoj.

Ĉar laŭ la statistiko pri lerneja kampanjo, komunikita en la antaŭparolo de la Jarlibro 1961 de U.E.A., en la lerneja jaro 1959/1960 proksimume 14,000 gelnantoj studis Esperanton en ĉ. 380 lernejoj en trideko da landoj, estus konsilinde atentigi la prezidantinon de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, F-inon J. Dedieu, 70, Avenue V., Segoffin, Toulouse, Francujo, pri la graveco de nomita libro, ke ŝi rekomendu ĝin uzi al la geïnstruistoj Esperantistaj dum la kursoj.

Mi pensas, ke per tio ni instigos la eldonistojn.

Sincere via,

*Julio Nemethy.*

Tre Estimata Redaktoro,

Mi revis starigi Societon jam antaŭ tri jaroj, sed ne povis. La aliaj dek tri Esperantistoj ekkonis la Internacian Lingvon per miaj artikoloj publikigitaj anglalingve en angla gazeto ĉe ni, kaj per miaj prelegoj maltlingve ĉe la Malta Radio. Ĉi tiujn artikolojn mi alsendis al la Brita Esperanto-Asocio.

La 26-an de decembro, 1961, mi

renkontigis, la unuan fojon, kelkajn el miaj konataj Esperantistoj. Verdire, tiuj, kiuj promesis subteni la Societon novan estas dek tri sed bedaŭrinde nur 7 ĉeestis, je ĉi tiu renkontiĝo, kiel vi povas vidi el la foto. Kvankam ĝis nun ni ne povis trovi taŭgan renkontejon, ni decidis fari niajn kunvenojn en unuaranga Kafejo ĉe la Kapitalo, Valletta. Ni estas vere lingvistoj: krom nia nacia lingvo: la malta, kune kun la angla kaj la itala, mi mem scias ankaŭ la araban, la hebrean kaj la francan; alia la rusan, alia la germanan. Krom tri, la aliaj estas nur komenkantaj Esperantistoj. La nomo de nia nova Societo estas: "Societo de Malta Esperantistoj".

La Reĝa Biblioteko Malta havas nur unu libron pri Esperanto. Ĉar nia nova Societo estas malmultenombra, ni ne povas aĉeti librojn nun. Do se iu Esperantisto deziras nin helpi propagandecle, li povas alsendi al la Prezidanto librojn pri aŭ en la Internacia Lingvo, precipe gramatikojn kaj legolibrojn. Rekompence, ni alsendos bildkartojn pri nia Insulo kaj portreton de la oficiala libroaldono al la Bibliotekisto. Kiu helpos nin? Antaŭdankon!

Via, *Carmel Mallia*, A.I.L.(Fr.).



*Kelkaj membroj de la Societo de Malta Esperantistoj, starigita la 26-an de decembro 1961. Meze, la Prezidanto, S-ro Carmel Mallia.*

## BELARTA KONKURSO 1962

Niaj verkistoj estas invitataj konkuri en la Belarta Konkursio 1962, la dektria en la serio.

### Literatura Sekcio

**1. Originala Poezio** (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).

**2. Tradukita Poezio** (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj, tamen la komisiono rezervas al si la rajton fari escepton en tiu postulo, se temas pri traduko el la literaturo —ekz. la japana— kies poemoj estas esence mallongaj).

**3. Originala Prozo** (novelo, eseo, artikolo, aŭ simile; ĉiu prozaĵo po 2,000–3,000 vortoj).

**4. Originala Drameto** (ĉu por sceneja prezento, ĉu en formo de radiodialogo; maksimuma ludodaŭro 25 minutoj).

Internacia komisiono juĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj okazos en tiucela kunsido dum la 47-a Universala Kongreso en Kopenhago. En la sama kunsido oni laŭtleĝos el la premiitaj verkoj. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj monpremion. Por ĉiu branĉo estos po tri premioj; tamen la komisiono rajtas reteni premion aŭ premiojn, se ĝia opinie la cirkonstancoj tion postulas.

**Nova Talento:** la komisiono ankaŭ aljuĝos diplomon kaj monpremion al tiu persono, kiu sendos la plej bonan verkon de verkisto premiita nek en ĉi tiu konkursio, nek en la dekdu antaŭaj.

### Generalaj Reguloj

1. Principe, ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 47-a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de U.E.A. Tamen, ĉe verkisto loĝanta en lando, kie plenumo de tiu kondiĉo estas ekstreme malfacila, oni laŭ bontrovo allasos konkursiaĵojn akompanatajn de klarigo pri la cirkonstancoj.

2. La konkursa kotizo (sendepende ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn konkursaĵojn por unu aŭ pluraj branĉoj): por britoj, 1 ŝilingo 6 pencej. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponojn: 3 respondkuponoj maldekstre stampitaj de la poŝto (bonvolu kontroli tion) aŭ malpli, laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas neebla, la partopreno estas senpaga.

3. Oni rajtas konkursi per maksimume tri (antaŭe en presformo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe branĉo 2 (tradukita poezio) oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj aperos laŭeble en la revuo "Esperanto" kaj sen la permeso de la redaktoro de tiu organo oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto.

4. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝin-skribataj. Oni sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en la traduka branĉo ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo la nomon de la branĉo, por kiu ĝi estas destinita. Oni ankaŭ skribu sur ĉio konkursaĵo pseŭdonimon, kiu efike kaŝas la nomon de la aŭtoro. Oni skribu sian nomon kaj adreson sur aparta slipo kun la pseŭdonimo kaj kun aŭ sia kongresnumero aŭ membromarko de U.E.A. Eventuale, oni aldonu klarigon laŭ la senco de la dua frazo de regulo 1.

5. Oni sendu ĉion: konkursaĵojn, slipojn, eventuale respondkuponojn, ktp. al la peranto: S-ro Albert V. King, 20 Lodore Road, Fishponds, Bristol, Anglujo.

La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 31-a de majo, 1962.

*William Auld* (Sekretario).

## ESPERANTO EN RADIO

(Ĉiuj horoj G.M.T.)

**Radio Varsovio** (249 m., 48.43 m., 42.11 m., 41.99 m., 41.12 m., 31.50 m., 31.43 m., 31.01 m.): ĉiutage je 15.30.

**Radio Bern:** lunde kaj merkrede je 12.20, jaŭde kaj sabate je 21.15. Ondoj: 48.66 m., 31.46 m., plus tagmeze 13.94 m. kaj vespere 26.61 m.

**Hilversum** (402 m. aŭ 298 m.): vendrede je 22.00.

**Radio Roma** (50.34 m., 41.24 m., 30.90 m.): marde, merkrede, vendrede je 17.55.

**Zagreb** (264.7 m.): jaŭde je 22.05.

**Prague:** La Ĉeĥoslovaka Radio, Fako por Aŭstrujo, komencis en Februaro elsendi en Esperanto regule ĉiun lastan jaŭdon de la monato inter 7.45 kaj 8.00 p.m. G.M.T. sur meza ondo 233.30 m. Temas pri proks. 6-minuta programo en kadro de kutima "Hobby Sendung" direktata al Aŭstrujo. La 29-an de Marto oni parolos pri *La Mondpaca Esperanto-Movado en ĈSSR kaj ĝia laboro*. Sugestojn aŭ almenaŭ ateston pri la aŭskulto sendu al: Ĉeĥoslovaka Radio, Sendung für Österreich, Praha, ĈSSR.



## THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION Inc.

### OFFICIAL NOTICES

**President:** Norman R. Smith, B.Sc., F.B.E.A.

**Hon. President:** M. C. Butler, M.R.S.T.

**Hon. Sec.:** C. M. Houghton, B.Sc., A.R.C.S. **Hon. Treas.:** H. W. Allen-Smith, F.B.E.A.

**Secretary:** J. W. Leslie, F.B.E.A.

**Registered Office:** 140, Holland Park Avenue, London, W.11. *Tel.:* PARK 7821

*Hours:* Weekdays 9 a.m. to 5 p.m. (closed 1-2 p.m.)

### NEW JUNIOR MEMBERS

Curry, D. R.	<i>Newark, Notts.</i>
Duncan, R. H.	<i>Dublin, 9</i>
Fantom, A. E.	<i>Birmingham, 17</i>
Rigby, J. H.	<i>Manchester, 10</i>
Stead, D.	<i>Welling, Kent</i>

### NEW MEMBERS

Barker, G.	<i>Keighley, Yorks.</i>
Birtwistle, Mrs. C.	<i>Poulton-le-Fylde</i>
Black, Mrs. M. C.	<i>Edinburgh, 7</i>
Crowfoot, Mr.	<i>Stockport</i>
Ernstzen, E. W.	<i>Wombourn, Staffs.</i>
Finnemore, J.	<i>Stoke on Trent</i>
Herring, B.	<i>London, S.W.19</i>
Inglis, W. T.	<i>Bristol, 2</i>
Kearney, R. A. M.	<i>London, S.W.19</i>
Kinder, A. G.	<i>Sale Moor, Ches.</i>
Newenham, F.	<i>Dover, Kent</i>
Overmire, Mrs. F. S.	<i>California, U.S.A.</i>
Pattinson, F.	<i>Bradford, 2</i>
Popplewell, N.	<i>Sidcup, Kent</i>
Pratt, F. R.	<i>London, N.W.11</i>
Rapley, Mrs. E. G. M.	<i>Ruislip, Middx.</i>
Scott, Mrs. M.	<i>Harleston, Norfolk</i>
Sykes, D. P.	<i>London, S.W.1</i>
Shears, J.	<i>Hull, E. Yorks.</i>
Walsh, Mrs. D.	<i>Manchester, 19</i>
Whalley, M. H. T.	<i>Halifax, Yorks.</i>

### SUPPORTING MEMBERS/FELLOWS

Garraway, Miss Esme *Sheffield, 6*

### DONATIONS TO GENERAL FUNDS

Previously acknowledged: £44 11s. 11d.  
 Under 2s. 6d.: 3s.  
 2s. 6d.: A. Neil, S. Nicholl.  
 3s.: E. C. Bowerman.  
 4s.: J. Halstead.  
 4s. 6d.: Sunderland Esperanto Group.  
 5s.: J. D. Applebaum, R. Bassett, H. G. Felce, H. S. Klug, C. G. Love, A. McLellan, St. Helens Esperanto Group, Mr. and Mrs. Warren.  
 9s. 6d.: E. R. Holt.  
 10s.: Mrs. C. I. Appleby, W. M. Appleby, E. Bailey, Miss M. S. Ferrimen, Mrs. V. M. Harbridge, G. H. Jeffery, Miss E. M. Robertson.

15s.: F. J. Rogers.  
 20s.: "Moffie"—in Memory of K. R. C. Sturmer, Mrs. R. Seddon.  
 35s.: L. Pegden.  
 30s.: K. Alexander.  
 £2 10s.: Miss E. Oldrey.  
 £3 10s.: A. Goloditz.  
 £10 9s.: W. T. Head.  
 Total to 20th February, 1962: £73 19s. 11d.

### "B.E." SUPPORT FUND

Previously acknowledged: £6 14s.  
 5s.: Mr. and Mrs. W. G. Atkinson, J. Brownlee, C. G. Love, Miss E. Woodget.  
 10s.: W. M. Appleby, E. Bailey, Mrs. E. B. Knight, Miss E. M. Robertson, D. Williams.  
 20s.: Miss Esme Garraway, Mrs. F. W. White.  
 25s.: L. Simpson.  
 Total to 20th February: £13 9s.

### ADVERTISING FUND

Previously acknowledged: £7 10s. 6d.  
 5s.: J. D. Applebaum, Mr. and Mrs. W. G. Atkinson, G. Bevan, J. Brownlee, C. G. Love.  
 10s.: W. M. Appleby, E. Bailey, Dr. A. K. Beck, D. N. A. Bytheway, E. W. Moberly, Miss E. M. Robertson.  
 20s.: L. Pegden, Mrs. F. W. White.  
 Total to 20th February, 1962: £13 15s. 6d.

### LIBRARY RE-HOUSING APPEAL

Previously acknowledged: £16 1s. 9d.  
 2s. 6d.: A. J. Jones.  
 4s. 4d.: Miss E. McGarvie  
 5s.: G. Bevan, I. Flower, Miss Petrie, Miss E. Woodget.  
 10s.: W. M. Appleby, E. Bailey, Miss E. Berry, Miss Esme Garraway, E. W. Moberly, Miss F. Priestman, Mrs. B. Radcliffe, C. C. White.  
 10s. 6d.: Miss M. Boulton.  
 11s. 6d.: Mr. and Mrs. W. G. Atkinson.  
 20s.: Miss V. C. Nixon, Mrs. G. E. Russell, Mrs. F. W. White.  
 30s.: Dr. C. M. Bean.  
 £2: Blackburn Esperanto Group.  
 Total to 20th February, 1962: £29 0s. 7d.

**B.E.A. EXAMINATION RESULTS****Advanced Examination****Written Part**

\*Berrie, Dr. J. R. H. *Kaduna, Nigeria*

**Elementary Examination****By Correspondence**

\*Harris, W. F. *Wellington, N.Z.*  
 \*Knight, W. F. *Peacehaven, Sussex*  
 \*Watts, T. R. *Margate*

\* Denotes a candidate who has passed with Distinction.

**COUNCIL MEETING****London, 17th February, 1962**

*Present:* The President (in the Chair), the Honorary Secretary, the Honorary Treasurer and thirty-three Councillors. *In attendance:* the Secretary, the Honorary President and (part-time) the Editor.

*Date of Next Meeting:* 22nd April, 1962, at Southport.

*Business of A.G.M.:* The text of the Annual Report was considered and approved. The Annual Accounts were presented by the Hon. Treasurer and adopted. The text of the Annual Circular, including nominations of Officers and Councillors, was approved.

*C.M.H.*

**Avertoj:** 1. Alilandaj organizaĵoj nepre NE anoncu, ke B.E.A. estas via peranto, delegito, k.s. sen antaŭa konsento kun la Sekretario de B.E.A. 2. Ne sendu recenzajn librojn al la Redaktoro sed nur al la Sekretario de B.E.A. 3. Pri mortoj, k.s., de Membroj de grupoj (kiuj estas anoj de B.E.A.) oni bonvolu nepre informi la Sek. de B.E.A., kiu informos la Red. 4. Alvenigu sciigojn pri Okazantaĵoj antaŭ la 20a de la monato antaŭanta aperon.

**Krucvortenigmo : Solvo**

*Horizontale:* 1. estimi; portu la verdan stelon. 2. spalir; rr. 3. pin; laborinte. 4. er; virinet. 5. ripo; alo; irid. 6. atolo; ski. 7. nom; la; pan. 8. avo; trans. 9. olda; alt; arkt. 10. rodi; t.n.; re. 11. numismato; pal. 12. io; invad. 13. ekin.

*Vertikale:* 1. Esperanto en Skotlando. 2. spirito. 3. tan; pomad; mit. 4. il; vol; variol. 5. mili; oro; os. 6. rara; admon. 7. bilg; alia. 8. ozono; tio. 9. re; sat; ton. 10. tritik; ran; ve. 11. urn; ripar; pak. 12. ankradi.

*A. D. Cook.*

**Naskiĝo**

Al **Ges-roj A. E. R. Taylor**, el Bedford, naskiĝis filino, June Alexandra, la 20an de Januaro, 1962.

**Mortoĵ**

*Kun granda bedaŭro ni anoncas:*

La 9an de Februaro mortis 89-jara **S-ro J. H. Waters**, el Southport, Esperantisto de 1906 kaj membro de B.E.A. 1948-1952 kaj 1956-1962.

La 15an de Januaro mortis **S-ro J. Butterworth**, el Rochdale, fidela membro de la loka Grupo dum tridek jaroj. Lia kamaradeco estos ĉiam memorata.

La 20an de Februaro mortis **D-ro Marek Wajsbium**, la konata Esperantologo. Nekrologo sekvos.

La Esperanto-Klubo de East Ham, Londono, kun granda bedaŭro anoncas la morton de valora kaj tre ŝatata membro, **Doktoro Lucio de Miranda**, kiu mortis en hospitalo je la 12-a de Januaro.

D-ro Miranda naskiĝis en Goa, kaj je la aĝo de dek ses vojaĝis al Portugalujo por studi en la Universitato de Lisbono. Tie li akiris diplomon kaj komencis instrui la matematikon en liceo. Poste li translokiĝis al San Miguel, unu el la Acoroj Insuloj, kie li renkontis la U.E.A.-delegiton, S-ron Frederiko Serpa, kiu interesigis lin pri Esperanto kaj kun kies nepino li edziĝis. La idealoj de Esperanto multe impresis D-ron Miranda, kaj poste li mem iĝis la delegito por la Acoroj. Li reiris kun S-ino Miranda al Goa por tri jaroj kaj poste laboris en Madeiro kaj denove en la Acoroj. En ĉiuj el tiuj lokoj li instruis ne nur sian profesian temon, la matematikon, sed ankaŭ Esperanton. Tamen bedaŭrinde, pro la malpermeso de la Portugala registaro, li devis ĉesigi kaj la instruon de Esperanto kaj la U.E.A. delegitecon.

En 1954 li venis al Anglujo kaj baldaŭ aliĝis al la Esperanto-Klubo de East Ham, kie li montris sin tre populara kaj helpema membro, alte estimata de ĉiuj, kiuj konis lin. Nelonge antaŭ la morto li komencis instrui postlernejan kurson pri Esperanto en la lernejo de Grays, kie li tiam laboris. Li estis ankaŭ membro de la "Society of British Esperanto Teachers".

Doktoro Miranda estis bonega Esperantisto, kiu interesigis pri, kaj sindoneme laboris por, multaj liberalaj kaj idealistaj movadoj, fervore subtenata de S-ino Miranda, kiu tutkore simpatiis kun liaj ideoj.

*G. Osmotherly.*

# SMALL ANNOUNCEMENTS

3d. per word. Minimum 3s. per issue. Prepaid

Copy must be received at the B.E.A. Office by the 20th of the month

**Tiam ekblovis la tri taĉmentoj** per la trumpetoj kaj rompis la kruĉojn, kaj ili tenis en la maldekstra mano la torĉojn, kaj en la dekstra la trumpetojn por blovi, kaj ili kriis: Glavo pro la Eternulo kaj pro Gideon! **Juĝistoj 7.20.**

**"The British Esperantist"** can be obtained for 15 shillings a year post free.

**Kvakera Esperantisto:** Specimen copy 6d. Redakcio: 5, Cotham Park North, Bristol, 6.

**The Workers' Esperanto Movement** associates world friendship with trade union, co-operative, and socialist principles. Details and magazine sent free: 27, Argyle Road, Ilford, Essex.

**Thomas Bennett School, Crawley.** Wanted for Sept., good honours graduate to teach FRENCH/ITALIAN. Esperanto is on the curriculum. Housing probably available through West Sussex C.C. Full details from Head of Foreign Languages, Mr. R. Markarian.

**Scouts!** Join the Scouts' Esperanto League. Enquire 42, Westbourne Street, Oldham, Lancs.

**Ordering Cyril Lord Carpets?** Let your Esperantist agent help you with samples, measuring and ordering. Ken Hegerty, BOWes 7467.

**Reciprokal Vizitoj.** Ni ne estas esperantistoj, sed ni estas amikoj de lektoro Johan Hammond Rosbach. Ni deziras kontakton kun familio brita, kies patro—prefere—estas en la ŝu-komerco, kaj kiu

havas filinon 16-18-jaron. Celo: Reciprokal vizitoj por lerni la anglan lingvon. Skribu al: Disponanto Bjorn Olsen, Korsgaten 31, Sarpsborg, Norvegujo.

**"Scienca Revuo"** (nova eldono el Jugoslavujo). Abono 12s. 6p.; kun membreco de Internacia Scienca Asocio Esperantista 17s. 6p. Anoncu vin ĉe la oficiala delegito John Rapley, 89, Mount Pleasant, Ruislip, Middlesex.

**Deziras Korespondi kun Angloj:** Mateo Coronas, Mayor de Gracia 152-4-1, Barcelona (12), Spain.

**Ĉina Samideano** volas interŝange ricevi Linguaphone diskojn. Skribu al Box 21, B.E.A., 140, Holland Park Avenue, Londono, W.11.

**S-ro W. White, Lochgelly,** tutkore dankas siajn geamikojn pro la esprimoj de simpatio kaj kondolenco.

**Kiu deziras akiri la kompletan jarkolekton** de la 3a periodo de Literatura Mondo (1947-1949)? S-ro Ladislao Somlai, Bajcsy Zsilinszki-ut 40, Budapest, V, interŝangus ĝin kontraŭ librojn. Li aparte serĉas la du en Anglujo eldonitajn librojn, "Tatterley" kaj "Lilio".

**Helsingør:** loko de la Antaŭkongreso 29/7-4/8 kun feriaj kursoj, prelegoj, distrado, kaj ekskursoj. La internacia Altlernejo estas la Antaŭkongresejo. Senpage sendos al vi nian programon kaj invitas vin plej kore L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj, Danlando.

**THE British Esperanto Association** consists of men and women who believe that Esperanto is one of the important factors of modern progress; that by its aid international communication of every type is facilitated. Esperanto is intended not to replace the national tongues but, acting as a second language for people of all nations, to facilitate both written and spoken communications between them. **YOU** are invited to co-operate in spreading a knowledge of Esperanto by completing the following application for membership:—

SUBSCRIPTION: 30s. per annum. Persons joining after 1st July may pay 15s. to end of current year—those under 21 may join as Junior Members at half rates.

TO THE SECRETARY, THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC.),  
140, HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11.

I, .....

hereby apply for membership of THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.) and enclose the first Subscription of .....

Signature .....

Nationality ..... Rank, Profession or Occupation .....

Address .....

Date ..... Age (if under 21) .....

## PLI OL 36,000

ekzempleroj de la “Epoko” Libroj estas jam venditaj. Kial? Ĉar ili estas malmultekostaj kaj interesaj libroj, tre taŭgaj por la distra horo. Tralegu la liston.

N-roj 3-6 po 2 ŝil.—N-roj 7, 9, 10, 11 po 4 ŝil.

Aldonu 5p. por afranko por ĉiu numero

1. Tute elvendita.
2. Tute elvendita.
3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse. El la Angla G. Badash. 188 paĝoj—La konata Angla humoristo rakontas. . . .
4. **La Tempo-Maŝino: Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells. El la Angla E. W. Amos. 188 paĝoj—Spertoj pere de la tempa fervojo.
5. **Princino de Marso.** E. Rice Burroughs. El la Angla K. R. C. Sturmer. 190 paĝoj—Aventuroj sur alia planedo.
6. **Colomba.** Prosper Merimée. El la Franca J. Beau. 188 paĝoj—Pri Korsikaj interfamiliaj kvereloj.
7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlányi. El la Hungara L. Spierer. 156 paĝoj—Kiel maldungito venĝis sin.
8. Tute elvendita.
9. **Brulanta Sekreto** kaj aliaj rakontoj. Stefan Zweig. El la Germana K. R. kaj P. E. Schwerin. 160 paĝoj—Psikologiaj kaj aliaj interesaj rakontoj.
10. **Kiso de la Reĝino.** I. F. Najivin. El la Rusa D. Staritsky. 188 paĝoj—Aventuroj en la Belga Kongo.
11. **La Karnavalo kaj la Somnambulino.** K. L. Immermann. El la Germana A. E. Wohlthat. 104 paĝoj—Romantika aventuro malnovstila.

*Eldonitaj de*

**THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD., ANGLUJO**

*Mendu ĉe*

**BRITA ESPERANTISTA ASOCIO**

**140, Holland Park Avenue, London, W.11**

aŭ vialanda libroservo